

Theodor Storm,

## Konscias mi pri l' tempoflu'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Konscias mi pri l' tempoflu',  
Ke devos mi forlasi vin,  
Ke kantos lastan kanton mi,  
Ke venos lasta kis' je l' fin.

Ankoraŭ mi ĉe via buŝ'  
Avide-time pendas mi;  
La lastan kison de l' junec'  
La lastan rozon donas vi.

Al mi el jen sorĉ-kalik'  
Enverŝas lasten gluton vi;  
Vi estas de l' fabelo-mond'  
Vespera lasta lum-radi'.

Sur la ĉiel' la lasta stel'  
Vi estas kvazaŭ ja por mi;  
Ne retenigu via kor',  
Feliĉo lasta estas vi.

Sentigu foje vi al mi,  
Maperonta en malhel',  
La plenan senton de la viv'!  
Subigu poste mia stel'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Wohl fühl ich , wie das Leben rinnt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en la Germanan de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2002-04.*

*MR-388-1 / Arg-201-399 (2004-03-06 06:50:54)*

*Mi trovis tiun chi poemon en la libro „Theodor Storm - Werke“ eldonita de la eldonejo Droemersch Verlaganstalt München por la Germana Libroklubo (Deutscher Buchklub Bochum) el la jaro 1954.*